


La Brita Esperantisto

Septembro – Oktobro 1979



La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

75A Jaro, N-RO 831

Septembro–Oktobero 1979

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF.

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

Salutkartoj

okaze de la festsezono

(vidu nian kovrilbildon)

BEA ĵus eldonis novan serion da festsezonaĵ salulkartoj speciale desegnitaj de la konata artisto Jennifer Campbell. Ĉiu desegnaĵo portas tekston en Esperanto, kaj interne troviĝas la salutoj "Sezonaj salutoj" kaj "Seasonal Greetings". La desegnaĵoj estas:

1. La babela turo. 2. Dipatrino. 3. La tri magoj

Prezo de 15 kartoj (elektu mem la kvanton de ĉiu desegnaĵo);

£1.00 inkl. de VAT kaj afranko

MENDU DE B.E.A.!

Support the Esperanto Movement's own Travel Agency by making all your Cross-channel Ferry bookings with us. Speedy and efficient service.

Esperanto Holidays Association,

Nacton, Ipswich.

Telephone: 0473-79300

Librokultura renesanco en Hungario

Zorgaj sekvantoj de la Esperanta libromerkato povas konstati, ke lastatempe ĉiam pli abunde alfluas libroj el Hungario. Anonco sur la dorsa kovrilo de tiu ĉi n-ro de BE havas la sloganon *Kvazaŭ reviviĝus LITERATURA MONDO . . .* Por havi klaran bildon pri la fono de tiu agado, ni intervjuis s-ron Vilmos *Benczik*, redaktoron de la revuo *Hungara Vivo*, kaj estraranon de Hungara Esperanto-Asocio pri eldona agado.

Ĉu vi blufas, aŭ vere reviviĝis Literatura Mondo?

Tion prijuĝu la legantoj: ĉiukaze, en tiu ĉi jaro – almenaŭ kvante – ni ne postrestis al la produktado de Bleier. De januaro ĝis nun eliris 11 libroj sur pli ol 2000 paĝoj. Kaj la jaro ankoraŭ ne finiĝis . . . Dank' al Dio, ni jam trapasis la teknikajn malfacilaĵojn de la komenco, kaj pri niaj novaj libroj ni ne plu bezonas honti . . .

Ĉu vi povus skizi la esencon de la eldonpolitiko de HEA?

Ni havas tri celojn. Per la Internacia Lingvo ni klopodas diskonigi la ĉefajn valorojn de la lingve izolita hungara literaturo, kiu lau fama kultura eminentulo de Esperantujo – nomata William *Auld* – estas unu el la “grandaj literaturoj” de la mondo. Due, ni volas eldoni originalajn verkojn – beletrajn kaj fakajn – de hungaraj esperantistaj aŭtoroj. Kaj trie, ni volas represi la plej gravajn verkojn de la originala literaturo, kaj ankaŭ per kompilado de diversaj antologioj ni esperas kontribui por revivigi la revivigindan parton de la E-a literatura tradicio.

Per kiuj verkoj vi pensas kontribui al tiu celo?

Unuavice per *Baza literatura kresto-*

matio, kiu donas specimemon el la verkaro de ĉiu vere signifa E-a aŭtoro de *Zamenhof* ĝis *Valano*. La materialo de tiu libro esperas fariĝi literatura minimumo por ĉiuj esperantistoj, kaj instigi ilin al plua legado. Saman celon servas 25 *jaroj*, en kiu aperas kremo de la verkoj, premiitaj en la *Belartaj Konkursoj* inter 1951–1975. *Libro de romanoj* rekondukas la legantojn al la fruaj tradicioj: mi rerakontas en ĝi – donante ampleksajn specimenoj el la verkoj mem – ĉiujn romanojn de *Vallienne* kaj *Luyken*. Kaj nepre notindas ankaŭ *Gvidlibro por supera ekzameno* kaj *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, kiuj disvastigas bazajn konojn pri niaj movado kaj literaturo, tiamaniere preparante la grundon por akcepto de la kulturaj valoroj de Esperanto. Revivigon de tradicioj servas ankaŭ la represo de *Enciklopedio de Esperanto*, kaj pluraj aliaj represo.

V. Bleier havis siatempe du celojn: doni eblojn al la plua progreso de la alta literaturo, kaj krei vastan legpublikon. Momente ni emas koncentri niajn fortojn pri la dua punkto. Ni volas atingi, ke la veraj konsumantoj kaj komprenantoj de la E-aj kulturvaloroj ne estu nur ĉ. duonmilo da homoj, kiel estas nun, sed ke tiu cifero almenaŭ dekobliĝu. Kaj ni havas jam rezultojn tiukampe: dum apenaŭ du jaroj ni vendis preskaŭ 2000 ekz. de *Kvaropo*, kvankam la libro estis teknike . . . iom malalloga. Ni volas *demokratigi* la E-an kulturon, sen fari cedon pri kvalito. Kaj tio eblas, nur necesas konscie labori por tio.

Kiuj novaj originalaj verkoj de hungaraj aŭtoroj estas atendeblaj?

Baldaŭ eliros la – laŭ mi atute bona – novelaro de E. Tóth: *Lappar, la Antikristo*. Sekvos la sciencfikcia novelaro *La naŭa kanalo* de I. Nemere. Verŝajne nur

venontjare aperos la ampleksa romano *Adolesko* de B. Wacha, kaj la poemaro *Katoj kaj ĉevaloj* de A. Hules. Jam estas kompostata ankaŭ la kompletega – ĉ. 400-paĝa – *Historio de la Esperanta teatro* de Á. Abonyi-Nagy. Kaj pluraj aliaj manuskriptoj atendas sian vicon.

Ĉu HEA posedas orminejon, ke ĝi kapablas financi ĉion ĉi?

Bedaŭrinde ne, ni devas trovi monon el fontoj pli prozaj. Kaj ankaŭ ŝtata subvencio fluas al ni malpli vigle, ol multaj supozas. Fakte la negativa saldo de nia eldona agado estas jam konsiderinda; mi ofte aŭdas, ke “Benczik estas la plej kara knabo, kiu iam sidis en la estraro de HEA”. Sed mi ne dubas, ke iom post iom ni trovos tiujn manierojn de kolportado, per kiuj mi povos fariĝi “knabo malpli kara”. Necesus iom pli vigla laboro de la libroservoj. Tio dependas ankaŭ de klopodoj. Librojn oni aĉetas, nur se oni ŝovas ilin sub la nazon . . . Dum la lastaj tri jaroj kvinobliĝis la jara enspezo de la Libroservo de HEA, kaj nun tiu sumo egalas 140-oblon de la meza monatsalajro en Hungario. /Maksimume 10% de tiu sumo rezultas el vendado de lerniloj – tiujn vendas ĉefe ŝtataj librovendejoj! / Ĉu vi povus diri, kiom da britaj monatsalajroj egalas la jara enspezo de la Libroservo de BEA?

Revene al la financoj: ni faras nian eblon konigi niajn eldonaĵojn al ĉiuj esperantistoj. Espereble ankaŭ la reklamo, kiu aperas en tiu ĉi numero de BE, efikos iomete.

Literatura Mondo ne estis nur eldonejo, sed ankaŭ revuo. Ĉu Hungara Vivo konsideras sin ĝia posteulo?

Nur parte. Ni ne povas dediĉi multan spacon al alialandaj kulturoj, sed *jes ja al la originala E-kulturo*, sendepende de la nacieco de la aŭtoro. El nia konsiderinda amplekso – 240 grandformataj paĝoj jare – ĉ. duono rekte rilatas Esperanton: literaturon aŭ movadon. Tamen, esperantistoj ekster la socialismaj landoj ŝajnas ignori ĝin. Mi ne kuraĝus nomi ekz. la

nombron de abonantoj en Britujo . . .

Antaŭ kelka tempo iu – ne brita – esperantisto skribis al mi, ke HV estas “vulgara komunista propagandaĵo”. Mi respondis al li ĝentile, petante lin nomi tiujn artikolojn, kiuj vekis en li tian impreson. Post kelkaj semajnoj li reskribis, ke tiajn artikolojn li ne povas nomi, sed la revuo estas teknike tro luksa, kaj *honest*a E. revuo neniel povus havi tian aspekton. Kiam en Lucerno mi rakontis ĉion ĉi al Waringhien, li komentis ĝin per franca proverbo: “Kiu volas mortbati sian hundon, nomas ĝin rabia.”

HV ne estas LM, tamen ŝatantoj de literaturo ne trompiĝos, abonante ĝin: aperas sur ĝiaj paĝoj verkoj de paradaj figuroj ĉiunaciaj de la E-kulturo. Lastatempe eĉ poemoj de la genia *Francis*, por kies poemoj vane vi sondus en aliaj revuoj . . . Jen, la plej ruza komunista propagando, ĉu ne?

Ĉu Budapeŝto volus rekonkeri sian iaman centran lokon en la E-kulturo?

Dio nin gardu de tio! Ni ne aspiras havi tiajn laŭrojn. Ni nur faras, kion diktas nia esperantista konscienco. Simple, ni fosas nian sulkon . . .

Sulkegon, tamen, laŭ mia opinio. Mi dankas vin, kaj deziras al HEA sukceson kaj multajn aĉetantojn. Miaflanke, mi atendas kun nesatigebla apetito la ventontajn eldonaĵojn.

Intervjuis W.A.

Sunfloro turnas sin al lumo,
 suflog' al jamaj vortoj:
 mi memorigu vin, aktoron,
 ne mem origu – plume –
 laŭ vi. Sed ne parolas tiel
 semaroj disblovataj
 de leontod' en kota korto.
 Mi ŝatas ambaŭ stilojn.

Kris Long

KELKAJ EL MIAJ "TREZORMOMENTOJ" DUM LA UNIVERSALA KONGRESO

La ekskurso al la pinto de Monto Rigi estis mirinda; ŝipe el Lucerno tra la lago ĉirkaŭata de altaj montopintoj; ne neprikscribeble bela. Poste ni veturis per dentrada fervojo supren laŭ akrega deklivo al belega vidpunkto pli ol 6000 futojn alta. Tie ni sekvis mallarĝan vojeton inter rokoj, kaj trovis ke en groto staras preĝejo tiel malgranda kaj simpla, ke ĝi ŝajnis tipa svisa dometo.

Ekstere estis ŝildo apud eta fonto. Grupo de esperantistoj staris silente kaj iom mire, provante traduki la surskribon: hungaroj, israelanoj, japanoj, svedoj, tro multaj naciecoj por listigi. Iu el la grupo nealtrude antaŭeniris, kaj lia voĉo diris la vortojn en Esperanto: "Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo . . . Restas do nun fido, espero, amo, kaj la plej granda el ili estas amo."

Dum mi rigardis la foran montopinton, mi sentis la ĝojon aŭdi tiun mesaĝon en unu lingvo kune kun homoj el multaj mondpartoj.

* * *

Okazis koncerto de svisa muziko por la esperantistoj, kaj ankaŭ por "Europa Cantat", muzikfestivalo por gejunuloj el la tuta mondo, kiuj kunvenis por kanti. Tiun vesperon la esperantistoj kaj Europa Cantat kune faris aŭdantaron de ĉ. 3000. La vespero estis ĝuinda; svisa muziko sonis per unikaj instrumentoj, sed mia "trezormomento" venis, kiam oni forlasis la halon por hejmeniri. Tiam grupo de japanaj studentoj de E.C. spontane kantis sub la arboj, kun hela luno kaj la siluetoj de majestaj montopintoj. Laŭgrade la grupo kreskis ĝis 80 aŭ 100 studentoj el ĉiuj mondpartoj. Iu gvidis la kantadon, kaj por ke la kondukado estu

videbla, paro de delikataj manoj streĉiĝis super la homkapoj, kaj tiuj belaj manoj gvidis la kantadon per mildaj movoj, sed kun intensa esprimpovo. Poste mi vidis ke la gvidanto estis juna japano eble 18-jara.

Gejunuloj kunvenintaj por kanti, kaj esperantistoj kunvenintaj por interparoli lasis min ekzaltita. Dum ekzistas tiel mirindaj momentoj de kuneco, oni sentas ke oni ne rajtas malesperi pri la estonteco, eĉ se la fajrero estas eta en nia perturbita mondo. Certe plantiĝis semo de espero.

* * *

Dum la balo sidis ĉe nia tablo ĉarma japana junulino kun juna germano. Ili bele kundancis kaj videble ĝuis la kunulecon. Bedaŭrinde ŝia Esperanto estis tre limigita kaj ŝi parolis ĉefe per la okuloj. Dum la vespero progresis, ni rimarkis ke la junulo provis komuniki ion, sed ŝajne ŝi ne komprenis. Finfine li prenis plumon kaj skribis sur angulo de paper-tuko: "Ni estas bona edziĝparo". Poste ili denove kune ekdancis, kaj mi scivolis kio estos la fina rezulto.

* * *

Alia ekskurso kondukis nin sur la pinton de Pilatus, akrega montokresto super Lucerno. Tien ni iris unue ŝipe, poste per pendgondolo. La pinto donis belegan vidon; ni estis inter la altaj pintoj, kaj sub ni streĉiĝis la bela lago.

Dum ni malsupreniris en malgranda gondolo, forlasinte la pinton ni baldaŭ vidis sub ni solan montgrimpanton subenirantan laŭ la mallarĝa zigzaga pado, kun tipaj pezaj brunaj botoj, helaj ruĝaj ŝtrumpoj, blua dorssako kaj monta pioĉo. Sed ne, dum la gondolo aproksimiĝis ni vidis nur unu boton, unu ruĝan ŝtrumpon, paron da lambastonoj kaj, aldone, gajan ridetan vizaĝon de feliĉa homo eble 50-jara.

* * *

Distra vespero. Eta Korea knabo sesjara ludis Vivaldi violone. Lia tuta korpo moviĝis dum li ludis, kun nekred-ebla esprimpovo. Dum laŭta aplaudo li

staris, evidente atendente ion, kaj aperis, preskaŭ tro malgranda por esti videbla dum ŝi venis el la malantaŭo de la podio, lia fratineto, kvarjara, tenante kvazaŭ pupvioloneton. La aŭdantaro aŭskultis en mira silento dum ili ludis dueton de Paganini. La etulino staris sur la piedfingroj kaj preskaŭ ŝajnis fari dancmovojn kun la muziko.

Filisa Goodheir

BONKORA BULGARINO BRILIGIS BARLASTONON.

Barlastono iĝis "La Verdstela Koncentrejo" nur ĉar la ĉiujaraj tri intensaj kursoj celas helpi kursanojn koncentri sin sur serioza lingvolernado; la gvidantoj penas krei lernositucion iom kvazaŭ universitatecan; ian rigoreton intelektan, sed etoson demokratian kaj amikan.

Ni penas ĉiujare inviti talentan, simpatian alilandan gaston, kies ĉeesto pliinternaciigas la studojn; malpliigas krokodilemon (iĝintan ne nur maldiligenta sed malĝentila); kaj aldonas intereson. Kvankam la nuntempa financa situacio estas tia, ke eĉ vojaĝokostojn oni ne plene repagas, okazis diversaj grandaj oferoj . . . daŭre venas alilandanoj.

Pro financaj kaj aliaj kialoj, vizitantoj plej ofte venas el proksima okcidenta Eŭropo, ĝuste tiu mondoparto, pri kiu britoj malplej devas strebi al komprenemo. Bedaŭrinda limigo; ĉar kion celas, finfine, internacia lingvo? Estus bone, gastigi pli ofte en Barlastono neokcidenteŭropanojn, neblankulojn, fremdulojn kiel eble plej fremdajn.

Pro la multaj ekstraj malfacilaĵoj, nur unufoje antaŭe, dum 18 jaroj, orienteŭropano vizitis Barlastonon: Eli Urbanová, tre sukcese, pro iniciato de d-ro J. C. Wells.

Espereble plimulto konsentus, ke la 1979-aj barlastonaj kursoj plejparte sukcesis kaj stimulis; d-rino Kathleen Hall paciencie ŝtopis komencantojn kiel (feliĉajn) kolbasojn; d-rino Boulton ŝvitigis elitajn viktimojn super "nefareblaj" tradukekzercoj; Peter Weatherby konversaciigis kaj gajigis;

okazis prelegoj, forumoj, ekzercoj, ekskurso, koncerto, la kutima menuo: "ni-havas-metodojn-por-paroligi vin."

Sed la elstara ero de la programo estis la vizito de Rajna Konstantinova el Sofio – bulgarino, malmulte vojaĝinte, ĵus debutinte kiel florarbuste sincera prozistino interesa, jam gajninte tri premiojn. Ŝian viziton ebligis nur multaj oferoj de pluraj bulgaroj kaj britoj; sed ĝi vere larĝigis la barlastonan travivaĵon. Senpera, spontanea, sincera, vere persona kaj amika kontakto certe detruis multajn stereotipajn bildojn ambaŭflankajn.

Kun temperamento vere amikiĝema, simpatiopreta, Rajna konversaciis kun multaj, lerte instigis timhezitemulojn konversacii, montris intereson pri multaj aferoj, paciencie respondis al multaj demandoj. Inter homoj ŝi konstante kondutis kiel homfratino – ĝentile, tolereme, ĉiam klarige, neniam krie – kaj, ĝuste tial, kredige.

Antaŭ homoj, dum formalaj prelegoj, tiu modesta, milda virino iom surprizis multajn per la intelekta nivelo de vere antaŭpreparitaj, faktoriĉaj prelegoj, kaj la fajra vervo de natura oratorino. Estis momentoj, kiam kelkaj barlastonanoj eklarmis, ĉar Rajna vere sentigis al ili la multgeneracian suferadon de la bulgara popolo, kaj ĝian ĝojon pro lastatempaj plibonigoj. Ŝi sentigis tre instrue, kion decaj sociaj servoj, vastigado de sanigaj kaj klerigaj institucioj, novaj rajtoj, naciaj digno kaj aŭtonomeco, signifas por iu, kies personaj memoroj enhavas suferojn de antaŭevolucia epoko. Multaj el ni bonŝancaj okcidentanoj konfesis, ke post prelegoj de vera bulgarino, ni havas novajn konceptojn pri Bulgario, precipe pri progreso vera.

La bulgara kulturo estas preskaŭ nekonata en Britujo; prelego pri Ivan Vazov, kun multaj specimenoj, kontribuis ion al kompreno ne nur pri literaturaj meritoj, sed pri pensmaniero, kreita el spertoj, al ni iom fremdaj.

Eta somera kursaro ne estas mondsdua evento; sed ĉiu interŝanĝeto tia faras ion por forigi antaŭjuĝojn, larĝigi perspektivojn, frakasi trosimpligajn stereotipojn.

Rajna Konstantinova montris sin ideala persono por sukcesigi tiajn interŝanĝojn; fervore patriota, ŝi kun saĝa takto evitis tiujn krudajn sloganojn, kiuj tuj vekas suspektojn ĉe tiuj, kiuj ne jam kredas ilin; la sola ripetita frazo estis tiu “sub la Jugo”, kiu por bulgaroj estas vera historia epokodifino, kaj ankaŭ titolo de la romana ĉefverko de Vazov.

La programo estis tro riĉe varia por esti nur kurso pri Bulgario; En kadro de neŭtraleco, penslibereco, okazis ankaŭ prelegoj pri teologiaj kaj aliaj temoj; sed plej valora estis kredeble tiu vera amika kontakto kun vere fremda etoso.

Kaj se “Sub la Jugo” iĝis ankaŭ titolo por la altrada traduka seminario, pri tio ne kulpis la bulgara gastino . . .

M.B.

Geoffrey Chaucer

LA RAKONTOJ DE CANTERBURY

Jam skizis mi por vi la kunularon,
La rangojn, la ekipon kaj kialon,
Pro kiu kunveniĝis kavalkado
En Southwark ĉe l'gastejo, “La Tabardo”,
Staranta al “La Sonoril” najbare.
Sed nepras nun rakonti al vi klare
La disvolviĝon de la entrepreno
Ĉe la gastej' je l'nokto de alveno;
Kaj poste aŭdos vi pri la vojaĝo
Kun ceteraĵoj de la pilgrimado.
Sed nun mi petas, ke pro bona volo
Vi ne rigardu min en kruda rolo,
Eĉ se raportos mi en la rakonto
La historiojn plene kaj sen honto,
Eĉ se la vortojn mi ne revizias,
Ĉar same kiel mi vi bone scias,
Ke ĉiu ripetanto de rakonto
Respekton devas havi por la fonto,
Donante ĉiun vorton se li povas,
Eĉ se li iom krudaj kelkajn trovas.
Alie la rakonton li konfuzas,
Falsigas ĝin, aŭ fremdajn vortojn uzas.
Li ĝin ne ŝanĝu eĉ por sia frato;
Por ĝusta vort' ne servu surogato.
Parolis Kristo mem kun libereco,
Sed ĉu al Sankta Skribo mankas deco?
Kaj Plato eĉ – por sia legantaro –

“Parenca estu vorto al la faro.”
Pardonon petas mi, se rakontante,
Personojn mi prezentas ne laurange
En rajta ordo, kiel plej konvenas,
Ĉar fuŝas mia saĝo, vi komprenas.
La Gastejmastro ĉiun bonvenigas
Kaj al la noktomanĝo nin invitis.
Bonega estis lia provianto
Kun forta vin' por ĉiu soifanto.
Li estis taŭga viro por marŝalo
Oficianta en bankeda halo.
Impona korpe, brila okulparo;
En Cheap ne estis tia civitano.
Vireca hom' de bona edukado,
Parolis li sinfide kaj kun saĝo.
Li estis tamen gaja laŭ naturo
Kaj post la manĝo preta por plezuro.
Do post kolekto de la manĝopago
Atenton turnis li al amuzaĵo
Kun jena diro: “Nun sinjoroj vere
Mi ĉiun bonvenigas korszincere.
Ĝisnun verdire, en ĉi tiu jaro,
Neniu tiel gaja kunularo
Je l' sama temp' vizitis la gastejon.
Por via ĝoj' mi serĉis do ideon,
Kaj ĵus ekpensis mi pri amuzaĵo
Por vi tre plezuriga kaj sen pago.
Al Canterbury celas la vojiro;
Premiu vin benita la martiro!
Kaj bone scias mi, ke sur la vojo
Rakontos vi kaj ludos vi kun ĝojo,
Ĉar certe mankas ĝuo kaj plezuro
Al rajdantaro muta kiel muro;
Kaj tial mi, laŭ jam dirita vorto,
Aranĝos amuzaĵon por komforto,
Se plaĉos al vi doni la konsenton
Kaj plenakcepti mian juĝprudenton
Koncerne planon kiun mi eksplikos.
Jam morgaŭ kiam kune vi vojiros,
Mi ĵuras per l' anim' de mia patro,
Ke ĝojos vi – aŭ falu mia kapo!
La manojn levu sen parolo plua.”
Ni ne inklinis al konsent' malfrua,
Taksante ĝin ne inda de pesado,
Kaj ni konsentis do, sen kontraŭstaro
Kun peto gvidi nin laŭ lia volo.
“Sinjoroj,” diris li, “por propra bono,
Ne traktu la proponon malestime.
Jen la ideo klare kaj koncize:
Du belajn historiojn, por distrado,
Rakontu ĉiu el vi dum vojaĝo
Al Canterbury, kaj korinspire

Rakontu du aliajn hejmenire
 Pri aventuroj de pasinta tempo;
 Kaj kiu ajn superas en prezento
 De historio riĉa laŭ mezuro
 De altmorala sento kaj piezuro,
 Li noktomanĝos je komuna kosto,
 Sidante tie ĉi ĉe l' sama fosto
 Post nia pilgrimad' al Canterbury.
 Kun cel' gajigi vin ankoraŭ plie
 Mi volas mem agrable kun vi iri
 Je propra kost', kaj vin persone gvidi,
 Kaj kiu ajn de mia volo vagos,
 Li ĉies ŝuldojn sur la vojo pagos.
 Se do konsentas vi al plano mia,
 Vi tion diru nun sen vorto plia,
 Kaj mi pretigos min al tiu celo."
 Kun granda ĝoj' kaj ĵuroj pri fidelo
 Ni donis nian vorton kun petado
 Konfirmi lian rolon en la plano,
 Ke li bonvolu nin eskorti,
 Rakontojn niajn juĝi kaj raporti,
 Fiksante prezon por la manĝ' premia,
 Kaj lia volo estus super nia
 En ĉio ajn; kaj tiel en konsento
 Akordis ni al lia juĝprudento.
 Ĉe tio oni petis porti vinon;
 Eltrinkis ni kaj iris en la liton
 Sen plua prokrastiga babilado.
 Ĉel' sunleviĝo de l' sekvanta tago
 La Gastigant' kolektis nin per voko
 Simile kiel la kokinojn koko,
 Kaj ni ekrajdis je promena paŝo
 Ĝis la trinkiga loko de Tomaso.
 La Gastiganto tie ekhaltigis
 Ĉevalon sian kaj tuj al ni diris:
 "Sinjoroj nun aŭskultu, mi vin petas.
 Sendube vi promeson ne forgesas.
 Se nokto kaj mateno akordiĝas,
 Pri rakontant' unua ni deciduos.
 Je mia gust' por vino en la kruĉo,
 La ribelanto kontraŭ mia juĝo
 Vojaĝajn ŝuldojn pagos ja por ĉiu!
 Nun antaŭ pluaj paŝoj lotojn tiru,
 Kaj kiu la plej kurtan pajlon havos,
 Li la unua al ni rakontados.
 Sinjoro Kavaliro, mia lordo,
 Nun tiru vian loton laŭ akordo,
 Kaj moŝta Priorin', antaŭen pasu.
 Sinjor' Student', hontemon vian lasu,
 Studado for! Nun tiru ĉiu homo!"
 Nun ĉiu sin okupis pri la loto
 Kun jena rezultat', sen troa vorto,

Aŭ per la ŝanc', fortuna, aŭ per sorto
 La loto falis sur la kavaliron,
 Donante al ni ĝojon kaj inspiron.
 Memkompreneble li rakonti devis,
 Ĉar kune ni akordis kaj promesis.
 Ĉu do necesas diri plian vorton?
 Vidante ĉi bonulo sian sorton,
 Ĉar saĝon havis li kaj respondecon,
 Honoris li volonte la promeson.
 Li diris: "Ĉar la sorto min elektas,
 Je nom' de Dio, ĝin mi nun akceptas;
 Ekrajdu do kaj aŭdu historion."
 Ĉe tio ni reprenis la vojiron,
 Kaj dume li komencis gajmiene
 Rakonton sian, parolante jene:—

Cheap (elp. Ĉip.) Mallongigo de Cheapside, fama londona strato.

La martiro: St Thomas à Becket.

Trinkiga loko de Tomaso: Rivereto du mejlojn ekster Londono sur la vojo al Canterbury, kie legende la sanktulo foje trinkigis sian ĉevalon.

Trad. W. B. Johnson.

NE PLU BEZONAS PLENDI

Ja, ankaŭ mi mem plendis, ke oni ne povas aĉeti ĉiun novan libron en Esperanto, nek prunti ĝin por tralego. Tial jam dum kelkaj jaroj mi kutimas montri la recenzojn en niaj gazetoj al oficisto en nia urba biblioteko, kiu prizorgas la mendojn de novaj libroj, kun demando, ĉu ŝi povos mendi iun el tiuj titoloj. Kvankam ŝi kutime avertas, ke la financoj ne permesas aĉeti ĉiun novan libron, post kelkaj monatoj aŭvenas sciigo tamen, ke tiu aŭ alia el la menditaj libroj estas havebla. La lasta el tiuj sciigoj estis surprizo, ĉar la sufiĉe altkosta libro "Don Quijote" venis prunte el la Pruntsekcio de Brita Biblioteko en Boston Spa Wetherby.

Nu, mi ankoraŭ ne finlegis ĝin, sed kiam la libro reiros al la bretaro de Boston Spa ne lasu ĝin ŝimi tie. Laŭ mia kompreno oni povas prunti la librojn de tie, aŭ tra sia urba biblioteko aŭ rekte.

B.N.

LAŬ MIA OPINIO...

Kun granda plezuro mi legis la recenzojn en *La Brita Esperantisto*, majo-junio, kaj senhezite aldonas mian voĉon al tiuj, kiuj aprobas ilian aperon. Efektive, mi ĉiam – en ĉiuj revuoj atingintaj min – unue legas la parton kiu koncernas la librojn. Malgraŭ la novaj amaskomunikiloj, kiel la televido, ili restas nemalhaveblaj. Ekster dubo la libro daŭre estas la plej grava instrumento de la civilizo kaj la kulturo, kiuj kreiĝas kaj pluvivas en ĝi laŭ maniero speciala. Se tio veras pri la naciaj lingvoj, ĝi validas ankaŭ rilate al Esperanto, kaj eĉ pli; ĉar por multaj homoj – kiel mi – eldonajoj prezentas la ĉefan, preskaŭ la solan, metodon konservi signifoplenan kontakton kun la spiritaĵoj inter ni. Precipe tial mi ankoraŭ aktivas, konservas la fidon kaj mem verkas sur la kampo literatura, kvankam ĝis nun mi neniam renkontis eĉ unu amanton de nia poezio, krom per libroj, revuoj aŭ leteroj. Ĉu iu plendis pri la recenzoj? Nekredeble!

Edwin de Kock

En letero al vi mi komentis, eble tro leĝeranime, pri la fakto ke kelkaj artikoloj, kiuj ŝajne amuzas aliajn, ne multe amuzas min. Kiam laŭ via peto mi permesis publikigon, mi forĝis ke mi esprimas min iom krude, kiel mi ne malofte faras konversacie. Maltroigo ja ne estas universala virto. Ne venis en mian kapon, ke oni povus legi miajn vortojn kiel atakon kontraŭ personoj, kaj mi sincere pardonpetas pro la ofendo, kiun mi kaŭzis. Parenteze, mi povas certigi al Don Lord ke mi legis lian vojaĝraporton kun intereso.

Jes, Don, vi pravas, kiu verkas atendu kritikon, ne nur en la verda medio. El miaj du plej ŝatataj filozofoj unu estis mortkondamnita kaj devis trinki cikuton. La alian oni solene ekskomunikis, kaj samtempanoj diris ke li verkis sian libron en la infero kun helpo de la diablo. Do se nenio okazis al mi krom esti nomata tedulo aŭ stultulo, mi estos tute kontenta.

Laŭ Daphne, BE devas fariĝi plejeble

vulgara por ne fortimigi homojn. Jen enigmo. Vulgara laŭ PIV signifas ĝenerala aŭ triviala. Ĉu eble ŝi uzas la vorton anglisme kaj volas diri maldeca? Mi ne scias, sed almenaŭ ŝi indikas gravan nesolvitan problemon. Se ĉiuj, kiuj finis korespondkurson aŭ "Teach yourself", iĝus aktivaj esperantistoj, ni havus fortan movadon. Tio ne okazas, kaj neniu scias kial. Ĉu la lernintoj timigite forkuras, kiam ili renkontas ion kio invitas ilin uzi la cerbon? Ĉu, male, ili perdas intereson, ĉar ili trovas ĝeneralajojn kaj trivialaĵojn, kiujn oni jam pli ol sufiĉe trovas sen helpo de Esperanto? La lasta ŝajnas al mi pli verŝajna. Mi povas nomi esperantistojn, kiuj post lernado perdis intereson, sed entusiasmigis pro legado de iu Ŝekspir-traduko, aŭ poemaro kiel "Streĉita kordo" aŭ "La infana raso". Ĉu la perloj de Alariko k.s. havas similan efikon? Espereble, sed mi dubas.

Albert Goodheir

El Ĉinjo mi ĵus ricevis respondon de Sinjorino Ŝi Imin (vidu "La B E-on, Marto-Aprilo, p. 231). Kun la helpo de emerita instruisto, kiu gvidas la kursanojn en la lernado de Esp-kantoj ŝi instruas kurson de gestudentoj kaj gelaboristoj en Ŝanhajo. En la kurso partoprenas ankaŭ ŝia filo. Foton de kursanoj dum ilia ĉi-tiujara kurso ŝi sendis al mi. Ŝi ege interesiĝas pri la vivo kaj verkoj de Ŝekspir kaj volas legi plu el liaj verkoj en Esp-o. Ŝi verkas du librojn en la ĉina lingvo, uzante la perantan povon de la Internacia Lingvo por kolekti la enhavon. La elektitaj titoloj; "Fabeloj de ĉiuj landoj en la Mondo" kaj "Nacia Himno de ĉiuj landoj en la Mondo", kune kun iliaj muziksignoj.

Mi sendis al ŝi kelkajn lernolibrojn, revuojn, bildvortarojn kaj la kurson "Jen nia Mondo". Se iu volas help nin (aparte pri la provizo de fabeloj kaj naciaj himnoj) bonvolu sendi materialon al mi; Gavin Peebles, 17 Glenfield Road, LEICESTER LE3 6AT, ĉar mi povas skribi la adreson kaj la enhavon, uzante ĉinajn skribaĵojn. Antaŭdankon.

Gavin Peebles

NOVAJ LIBROJ

Esperantologiaj Studoj de Eugen Wüster. Eld. Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1979. 254 p. 21 cm broŝ.

Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado, red. Detlev Blanke. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1978. 227 p. 18 cm broŝ.

Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto de J. C. Wells. UEA, Roterdamo, 1978. 76 p. 23 cm broŝ.

Ĉiuj tri libroj havas la saman celon: esplori la esperanto-movadon kaj lingvon. Ili tion faras en medio de kaj lingvistiko kaj vivo, kaj supozas kleran kaj seriozan leganton. Por multe da homoj ili eble troviĝos tro penigaj; tamen, ĉiu verko meritas kaj rekompencos studadon. Du estas kolektoj da artikoloj aperintaj en diversaj gazetoj, kaj tiu de Wells estas bazita sur serio de prelegoj prezentitaj en la kadro de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno en 1976.

Esperantologiaj Studoj

Wüster enkondukis la terminon *esperantologio* en la movadon en 1921 per artikolo "*Esperantologio kaj Esperantologio*". Ĉi tiu estas unu el la 13 eroj de memorkolekto da lingvistikaj studoj, kiujn Wüster verkis inter 1917 kaj 1966, la unuaj 12 en esperanto, kaj la lasta en la germana (esperantigis la redaktoro Reinhard Haupenthal).

Wüster estis profesia lingvisto, kies fako estis terminologio kaj leksikografio. Dum sia vivo li profesoris en la Viena Universitato, disponigante sian terminologian ekspertizon al Unesko. Laŭ Haupenthal, Wüster savis esperantologion de 'diletantismo'. Jam en 1918 li komencis siajn laborojn super la *Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana*.

Al kio li celis? Li komencis per artikoleto pri la vortstrukturo, kies stimulo estis la akuzo fare de la Idistoj, ke esperanto "ne havas logikan vortstrukturon". En 1913 la Akademio jam oficialigis la principojn de neceso kaj sufiĉo, proponitajn de Saussure, modi-

fitajn de Höveler, sed en 1917 Wüster volis, ke la Akademio "*oficiale donu* al Esperanto ĝian skeleton, ĝian strukturon."

En 1921 Wüster konsideris tri fundamentajn reguladojn pri vortfarado, atentigante pri eblaj plursignifoj (kaj, do, miskomprenoj) pro neĝustaj kunmetaĵoj. Ĉiam poste li klopodis igi esperantistojn konsciaj pri problemoj, kiuj malhelpos, ke esperanto iĝu absolute taŭga lingvo por scienco kaj tekniko, kaj prezentis solvojn, kaj de principoj kaj de unuopaĵoj. Li ankaŭ prezentis esperanton al germanlingvaj leksikologoj kaj terminologoj en kadro de ekzistantaj ja tiklaj problemoj de ties scienco.

Nuntempe, kiam ni jam sorbis multajn proponojn de Wüster, kaj post kiam li influis tutan skolon da lingvistoj, oni povus kredi, ke li reprezentas tro ofte jam manĝitan pladon. Sed vere li estis la pioniro kaj aŭtoro de multo, kaj Stafeto faris grandan servon per la eldono, inter la kovriloj de unu libro, de la rezultatoj de vivlonga laborado.

Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado

En sia enkonduko Detlev Blanke diras, ke la monda lingvo-problemo "havas tre kompleksan karakteron, kun politika, ekonomia, socia, psikologia kaj aliaj aspektoj. Sekve la perspektivo de internacia lingvo precipe estas socipolitike determinita." Ĉiuj kontribuintoj estas el komunismaj landoj, kaj la eseoj viciĝas sub tri rubrikoj: historio, ideaj fontoj, kaj perspektivoj. Verkis: Drezen, Blanke, Isajev, Lins*, Podkaminer kaj Rátkai.

Mi trovis la plejparton el la eseoj ege interesa, aparte kaj ĝuste pro la severe socipolitika bazo de la analizoj. La Universala Kongreso en Varna, 1978, sendube malfermis la okulojn de multe da 'kapitalismaj' esperantistoj al la praktika viglo de la nekapitalisma esperantomovado. Estas, do, de fundamenta graveco, ke ĉiu povu disponi pri valoraj eseoj jam aperintaj en gazetoj plejparte neniam legitaj en okcidenta Eŭropo.

Du citaĵoj el artikolo de Ernest Drezen donos bonan perspektivon en la tutan kolekton. “Malakceptante kaj eĉ kontraŭbatalante la tutan politike-filozofian idearon de Zamenhof, ni devas kliniĝi antaŭ liaj lingvo-ideoj.” kaj, “Ankaŭ ni devas konstati, ke por ĉefverko de Zamenhof esperanto ĉe ĝia komenca ekfloro liaj fuŝaj politike-filozofiaj ideoj estis utilaj.” (La lasta ilustras la foje naciidiotisman stilon de la lingvaĵo.)

Alia artikolo, kiun mi trovis interesa, estis tiu de Lins, “Esperanto dum la Tria Regno”, en kiu li donas amason da informoj pri la nesukcesaj, kaj foje konsternaj, klopodoj de la germana esperanto-movado daŭrigi sin sub la nazioj. Nun, tiom da jaroj post tiu periodo, oni povas pli objekte juĝi aferojn. Ne sole la germanoj ne ĉiam komprenis, ke kompromisi kaj sin kompromiti povas esti la sama afero.

Blanke, en pensiga artikolo pri la “interna ideo” memorigas, ke “La internacia Esperanto-movado estas mikro-modelo de la internacie, politike diversmaniere strukturita homa socio.” Li poste aludas al “neneŭtralaj laboristoj kaj ‘neŭtralaj’ burĝaj esperantistaj grupigoj.” Dirindas, eĉ direndas, ke ofte, kiam okcidentlandaj esperantistoj nomas sin “neŭtralaj”, ili nekonscie supozas grandan kadron da ideoj kaj idealoj, kiuj por komunistoj estas tute ne akcepteblaj, ĉar efektive ili implicas politikan bazon antitezan al marksismo-leninismo. La legado de ĉi tiu libro helpas la okcident-eŭropanojn kompreni pli klare la filozofiajn problemojn de fenomeno unika en la historio de la mondo – la peno starigi tutmondan neŭtrale interhoman socion.

Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto

Sendube unu el la plej senpretendaj erudiciuloj en la tutmonda movado, d-ro Wells prezentas detalan ekzamenon de esperanto laŭ fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Tamen, oni ne devas esti fakulo por kompreni lin. La stilo estas simpla, kaj la teknikajn terminojn li klarigas dum li eksplikas.

Kontraste kun pluraj verkistoj pri

esperanto, Wells citas el lingvoj el la *tuta* mondo: angle, hindie, zulue, japane, ĉine kaj alie. Li klarigas la esencajn informojn pri fonetiko, agnoskante per tio kiom relative rara estas tia scio. (Se nur ĉiuj niaj erudiciuloj estus tiel realismaj kaj helpaj!)

Por ĝuste taksi esperanton, Wells prezentas esencajn lingvistikajn faktojn kaj konceptojn laŭ la supremenciitaj rubrikoj, kun abundaj ilustraĵoj, kaj poste ekzamenas esperanton en la sama kadro. Li, do, obligas al ni kompreni kia estas esperanto de pure lingva vidpunkto, sen kia ajn ideo filozofia. Li montras de tiu pure lingva vidpunkto kiel esperanto superas al kia ajn nacia lingvo kiel vere internacia komunikilo, kaj li tion faras per ekonomio da vortoj, kiu estas modela.

Sume

Neniu el la tri libroj estas senpene sorbebla. Tiu de Wüster estas la plej senkompromise teknika, supozante informitecon ĉe la leganto; la dua estas serioza esploro de temoj kun gravaj implicoj por la tutmonda movado; kaj la tria estas plej valora takso de esperanto kontraŭ la neŭtrala fono de la lingvistiko. Mi ĝuis, pro tute diversaj kialoj, ĉiujn tri.

D. S. Lord

**Tamen ne el komunisma lando. – Red.*

A Beginner's Course of Esperanto, de Rev. W. J. Downes, M.A., B.D. (redaktita de C.C. Preston kaj G. Tordoff). C. C. Preston, Bristol, 1978. 150p.

Nova kursolibro por parolantoj de la angla ĉiam estas bonvena, do kun aparta intereso mi ekzamenis ĉi tiun bele mimeografitan kaj bone binditan libron. Ĝi baziĝas sur kurso uzata dum multaj jaroj de akademiano pastro Downes.

Ĉe la komenco de la libro troviĝas antaŭparolo, kiu pritraktas la lingvan problemon en kristanaj rondoj. Tiun antaŭparolon oni povas bedaŭri, ĉar ne ĉiuj eventualaj uzantoj estas kristanoj.

Laŭ enhavo la libro estas treege tradicia, kvazaŭ oni eldonis ĝin en 1908,

ne 1978. Certe tia tradicia alirmaniero estas helpa por multaj plenaĝaj studentoj. (Lastatempe mi renkontis homon, kiu diris, ke li trovis neniun lernolibron pli bonan ol la gramatikon de Cox!). Unue en ĉiu leciono troviĝas gramatika klarigo. La ekzercoj, kiuj sekvas, konsistas plej ofte el frazoj por tradukado. Kelkfoje ilia enhavo estas bizara, ekz., "The blue pig is in the garden", "Foolish fathers are bad friends", "Will the cake be big and sweet?". Mankas ia ligo, krom komuna gramatika regulo, inter la sinsekvaj frazoj. Kvankam en la ekzercaro mankas ĉiutagaj vortoj kiel telefono kaj televido, preskaŭ ĉie troviĝas la vorto "kuko". La arkaika *ci*-formo estas prezentita. Ĉi tiu formo ripozu en paco!

Klaraj kaj ĝisfundaj estas la gramatikaj klarigoj kaj ili certe povus helpi komencanton kaj eĉ komencinton, kiu neniam serioze studis la bazajn regulojn. Foje oni pensas, ke lernanto pli facile komprenas la regolon se li/ŝi renkontas amason da ekzemploj.

La sola dubinda aserto en la sekcio pri prononcado estas, ke la esperanta vokalo 'a' aŭdatas en la angla vorto 'are'.

Foje la anglaj frazoj estas mainovstilaj. Neniu hodiaŭ dirus, "The sun beautified everything in the garden", aŭ "Such a big boy as you are must not fear the dark", eĉ se tiaj lingvaĵoj helpas esperantigi la frazojn.

La teknikoj de lingvoinstruado multe evoluiĝis dum la pasintaj dudek jaroj, dank' al la enkonduko de aŭdvidaj kaj aŭdlingvaj kursoj. Jam en 1964 la ekzamena instanco AEB forjetis la bezonon traduki en la fremdlingvon.

Malgraŭ ĉi tiuj mankoj oni facile povas trovi homojn, kiuj malfidas aŭdvidajn metodojn, kaj kiuj profitus el studado de ĉi tiu libro.

H. S. Chapman

Gutaro, muntita de Avoto. Esperanto Editions, Hastings, 1979. 64p. Prezo: £1,40.

Jen denove! "Mi mem ne pretendas

grandan poezian talenton" modestas Avoto en sia Postskribo. Des pli bone, ĉar tia pretendo estus malfacile pravigebla. "Kio estas poezio?" li demandas. Nu, mi ne scias, sed mi scias, kio ĝi ne estas. Ĝi ne estas morala traktaĵo, kaj ĝi ne estas teknika kapablo. Teknikan kapablon posedas Avoto, li lerte manipulas metrikojn kaj rimskemojn, sed li ne estas poeto, apenaŭ flagro de poeta sento montriĝas en la zorge konstruitaj versoj. Evidente Avoto estas amanto al la poezio kaj profunde studis ĝin, sed lia talento estas analiza kaj kritika pli ol kreiva. Malnova angla sentenco diras, ke ne nur kokino povas ekkoni putran ovon, do mi ne plendas pro la longa, kritika Postskribo, male mi plendas ke ĝi ne estas pli longa. Miaopinie, la libro estus pli valora, se la Postskribo estus la ĉefa teksto, — esearo pri la diversaj poeziaj formoj, kun la poemoj kiel ekzemploj por ilustrati ĝin. Avoto mem indikas, ke li celas ion tian, kiam li skribas: ". . . la sonetoj verkitaĵ de mi por la nuna libreto . . . celas nur montri al studentoj (*tiele!*) la vojon.

La aŭtoro donas bonan konsilon kaj plejparte sekvas ĝin, tamen troviĝas makuloj. Li admonas, ke "adasismoj estas evitendaj", tamen en "La semanto" (p.5) rimas *propagandindaĵon/novaĵon*. Li ankaŭ avertas pri "falsaj amikoj", sed en "Forlasita edzino" (p.10) uzas la vorton "agonio" anstataŭ "angoro". Ambaŭ estas fruaj verkoj, sed ĉu ne revizio konsilindas? Se mi ĝuste taksas la karakteron de Avoto, li konsentas.

Dafne Lister

En senvoja sovaĝejo, de Jacob Maris. El la nederlanda trad. Rejna de Jong. Kardo, Glasgovo, 1979. 24p. Prezo: £1,60.

Dum jaroj mi plendas pri la emo provi, en antaŭparoloj, senarmigi recenzistojn per tiaj modestaj vortoj, kiaj: "Krei elstare literaturan verkon li neniam intencis; la celon de la poemaro li mem klarigas en sia antaŭparolo . . ." (Rejna de Jong). En tiu antaŭparolo la aŭtoro skribas: "Multaj homoj ankoraŭ nun-

tempe pensas, ke en la psikiatraj hospitaloj, malantaŭ dikaj kradstangoj, troviĝas tre danĝeraj frenezuloj. Estas mia sincera deziro, ke fine oni ekkomprenos, ke tie vivas homoj . . .”. “Estas naive bagateligi aflikton, kiam oni estas sana kaj bonfarta.” Konsentite. Estas ankaŭ naive supozi, ke oni povas influi la sintenon de la menciitaj “multaj homoj” per manpleno da poemoj, se nur ĉar ĝuste la ŝtipkapuloj, kiujn oni celas, kutime ne emas al la poezio.

Jacob Maris estas ekspaciento de psikiatra hospitalo, kie li verkis la unuajn dek du poemojn; la finajn naŭ li verkis post resaniĝo, kaj miaopinie ĉi tiuj superas la aliajn, ne ĉar en la dek du troviĝas io “freneza” aŭ “sovaĝa” – male, ili pekas pro plateco pli ol patoso, sed ĉar kvin el la naŭ priskribas aliajn pacientojn, kaj en ili la verkisto trovas freŝan, desegnan stilon. Inter tiuj portretoj estas “Arie”, poemo simpla kaj kortuŝa. Legante ĝin, mi konatiĝis kun Arie dum “la rastil’ fidele lin apogis”. “Oni envenigis lin ĉe vesperiĝo/por lin ŝirmi kontraŭ la fridec’ de l’ mondo”. Jacob Maris ne plu estas ŝirmata, li revenis “al fridec’ de l’ mondo”, sed espereble li ankoraŭ observas kaj kunsentas inter ni “normalaj” homoj.

Dafne Lister

Elektitaj Fabeloj de Krilov. Tradukis: S. Rublov, ilustris: A. Laptov. Serio “Orienta-Okcidenta” n-ro 15 – Stafeto, 1979. 336 p.

Ĉu gravas la loko kie oni legas libron? Se oni sidas komforte en fotelo, ĉu tio influas la efekton? Mi legis ĉi tiun libron diversloke: ja sidante komforte, kuŝante en la lito kaj eĉ sunbaniĝante ĉe Kastelo Gresillon, Francujo. La legado ĉiuokaze kaj senescepte plezurigis.

Kiel oni povas konstati de la nombro da paĝoj, la fabeloj formas ampleksan kolekton, kvankam ili estas nedense presitaj. Ekzistas multo da blanka papero, kio ofte ĝenas legantojn, sed estetike la prezentado tute plaĉas. La ilustraĵoj estas neoftaj kaj ĝenerale konvenas al la teksto.

Ĉiuj fabeloj estas versaj, verkitaj laŭ la ‘tradicia’ maniero kun rimo kaj ritmo. Mi ne kapablas kompari kun la originalo sed la literatura stilo estas flua, verva kaj facile legebla. Ĉiu fabelo, laŭ tradicio, posedas moralaĵon kvankam ne ĉiuj rilatas al bestoj. Krilov ja viciĝas kun aliaj geniaj fablistoj, kiel Ezopo, Fedro kaj Lafonteno. La antaŭparolo fakte klarigas, ke la aŭtoro prenis kelkajn temojn de tiuj aliaj klasikuloj, sed la esenco estas rusa.

Por esperantistoj la plej grava afero estas la elstara tradukado de Rublov. En kelkaj paĝoj da klarigo tiu montras al ni sian detalan, preskaŭ pedantan, enprofundiĝon en la originalo, ankaŭ la strebado al perfekteco en reflektado de la originalaj senco, stilo, ritmo, rimo, interpunkcio kaj eĉ sonorito.

Laŭ mia opinio, Rublov ja sukcesis tiel bonege, ke ĉi tiu verko iĝos unu el la plej eminentaj tradukaĵoj en la Esperanta literaturo. Mi forte rekomendas ĝin.

Aleksandro Mollison

18-aj Internaciaj Floraj Ludoj. Okazintaj en la kadro de la 20a Kataluna Esperantista Renkontiĝo, 1978. Hispana Esperanto-Federacio, Zaragoza, 1979. 77p.

La Floraj Ludoj, do kulturaj manifestacioj, estas specialaĵo de la kataluna kulturo, kiun la katalunaj esperantistoj transdonis al la internacia Esperantomovado. Inter 1909 kaj 1936 ili 17-foje okazigis internacian festivalon de poezio kaj prozo; poste okazis la intercivitana milito kaj la dua mondmilito, kaj kun aliaj aferoj ankaŭ la Floraj Ludoj ne povis okazadi. En 1978 niaj katalunaj amikoj havis la belan ideon restarigi tiun manifestacion. Nun ili havis la ankaŭ belan ideon eldoni tiun ĉi libron, kiu enhavas la emociigan festparoladon de Manuel Casanoves kaj la premiitajn verkojn: ses poemojn kaj tri prozaĵojn. Inter la premiitoj troviĝas ankaŭ niaj amikoj Kris Long, kiu ricevis la premion “Natura floro” por elstara poemo “El taglibro por Kristina”, kaj Reto Rossetti, kiu ricevis la unuan subpremion por la

trafa "Tenera Saŭdado". La literatura kvalito de ĉiuj premiitaj verkoj estas kontentige alta, kaj espereble amantoj de nia kulturo kuraĝigos la katalunajn amikojn per akirado de tiu ĉi valora libreto. Ĉar, kiel prave substrekas Casanoves, Esperanto estas la amiko de malpli fortaj lingvoj kaj kulturoj (kiel, ekzemple, la kataluna). Li citas la gravurindajn sur graniton vortojn de Jaime Grau Cases: "Ni volas honori la lingvon de niaj praavoj per la lingvo de niaj pranepoj".

W. Auld

ĈINAJ ELDONAĴOJ

Porinfanaj bildlibroj:

Bela revulo. 1979. 40p. £0,35. **Benopeta ofero.** 1978. 114p. £0,85. **La fera multkolora kateto.** 1979. 38p. £0,35. **Liu Hulan.** 1978. 40p. £0,65. **Stormnokto ĉe landlimo.** 1978. 34p. £0,35.

Ĉinaj historioj:

Jihetuan-movado. 1979. 86p. £0,60. **La revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno.** 1979. 124p. £0,95. **La Reforma Movado de 1898.** 1979. 93p. £0,60.

Popolrakontoj:

Rakontoj pri fantom-spitantoj. 1979. 90p. £0,80.

Ĉiuj eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo, Pekino.

Tiel abunde aperadas libroj eldonitaj de niaj ĉinaj amikoj, ke fariĝas neeble ilin recenzi unuope. Ni povas nur rekomendi ilin surbaze de lingvaĵo, libroteĥniko (la koloraj bildoj en la porinfanaj libretoj estas vere belegaj), enhavo kaj . . . malmultekosteco. Kompreneble, ili estas subvenciitaj de la ĉina registaro, sed kial ni ne profitu el ties deziro diskonigi sian kulturon, precipe hodiaŭ, kiam finfine la ĉinaj esperantistoj povas viziti eksterlandajn kunvenojn kaj pli kaj pli da neĉinoj komencas viziti Ĉinujon?

Unu kuriozaĵo: **Rakontoj pri fantom-spitantoj** portas etiketon, "Unua eldono 1979". Kaj tamen en 1961 aperis jam unua eldono de tiu ĉi sama verkio!

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ

Sendube kelkaj niaj legantoj, precipe fakuloj en teknikaj kaj sciencaj aferoj jam konas tiun revuon, regule aperantan, kaj kiu estas aldono de la Budapeŝta Informilo. Ordinare la presaĵo estas leginda, sed la eldono de julio, 1979 estas precipe interesa. Inter diverstemaj artikoloj pri geologio, medicino, veterinaro kaj aliaj troviĝas ampleksa artikolo titolita 'La subakva arkeologio' de Bernard Golden.

La broŝuro (84 paĝa) estas havebla ĉe S-ro A. R. Mollison, 6 Rosemarkie Crescent, Broughty Ferry, Dundee DD5 2RQ je modesta prezo de £1,20 (inkluzive afrankon).

LINGVO

Nur tro facile estas, papumi pri lingvaj aferoj. Konokampo probable ne ekzistas, sur kiu la homoj posedas opiniojn pli insistajn, ofte bazitajn, konfesinde, sur "popollingvistikaj" teorioj kaj valorjuĝoj pri lingvo, al kiuj mankas ĉia lingvistika fundamento.

("It is all too easy to pontificate in matters of language. There is probably no area of knowledge in which opinions are held more vehemently, often based, it must be said, on 'folk-linguistic' theories and value judgements on language which have no linguistic basis at all.")

— *Report of the Sub-committee on Language and Learning, Glasgow English Working Parties.*

Kolombe griza, ŝtale blua:
malgranda diferenco.

Au ĉu? ĉielo, nuboj; plumo,
krajono — kiu? Pensu:
Ekpluvo viŝas l'inkon de
letero, kiun portas
kolombo. Pafo. Plumo falas.
Pintigu la krajonon.

Kris Long

ANONCETOJ

3p por ĉiu vorto. Minimume 45p. Antaŭpagenda.

LIBROJ: Komencanto serĉas tradukojn en Esperanto de Anglaj klasikajoj. Stato ne gravas. Rupert Townshend-Rose, 111 Thornbury Road, Isleworth, Middlesex, TW7 4ND.

Kio estas SAT? Sennacieca Asocio Tutmonda bonvenigas informpetojn. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB.

Are you using your insurance to help Esperanto at no cost to yourself? If not, please write to G. D. Carter, 51 Wyche Road, Malvern, Worcs.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from Norman Williams, M.A., B.Sc., 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, M34 1QL.

SCOUTS! Join the Scout Esperanto League. Enquire 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE.

MOTORISTS! Join the International Motorists Club (IEKA). Life Membership £1.65. British Representative: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS.

Volas korespondi:

Kunlernantoj de 8 ĝis 18 jaraĵ. Skribu al Barbara Chmolewska, Esperanto-Klubo, Palaco de Junularo, 00-901 Varsovio, Pollando.

15-jara Maksud Kanavatian, 14 Ladan Str. Leshker Str. Ahrazo, Irano.

Kun sindikatantiuloj skribu al Esperanto-Grupo, Molsĉnij Kombinac, str. Gorkogo 87, 354003 Soĉi, Sovetunio.

39 jara hungara juristo, S-ro D-ro István Szabó, Eger, Ciftakapu u.126/6 Hungario H-3300.

58-jara funkciisto. Vicente Gomar Batailer, Calle de Gregorio Gea, No. 11 VALENCIA - 9 Hispanio.

23-jara oficistino. F-ino Maria Szopeu, Krakow 47, 30-900 Novy Provocin, Str. Teligi 20/57 Pollando.

La sekvantaj anoj de komencanta kurso por blinduloj: Geedzoj Gualtriero kaj Daniela Valcavi; Gefianĉoj Mauro Barca kaj Ininia Tasciotti; S-roj Franco Capotobdō, Ermano Sica, Monaldo Blancamano, F-inoj Violetta Violet, Rita Leopardi 5, ANCONA, Italujo.

Anti-Ro Attitudes

NATIONAL ATHEISTS who believe that the human race is rightly "culled" by war, and who therefore accept the possibility of atomic destruction, logically oppose Ro.

OTHER ANTI-RO ATTITUDES often result from lack of integrated thought. This can be remedied by reflection.

ON WHAT IS YOUR ATTITUDE BASED? Do you oppose Ro World Government because you consider the absorption of the many into one an impossibility? But it has actually occurred over and over again throughout history e.g. in England in the 10th century, in N. America (formation of U.S.A.) in the 18th century. Do those who admit such developments regret them and wish to go back to former disunity? Is it that they believe unity right when achieved but wrong when attempted? Perhaps they swallow the silly Communist claim that a World State must be Communist. If a Communist World State develops, whose fault will it be now that Ro is here as the sensible alternative to Anachronistic Atheist Nationalism?

Ro is short for
Regneco. Write for
The Mitchell Report.



The Ro Organizer,
BM/World State House,
London W.C. 1.

Kvazaŭ reviviĝus LITERATURA MONDO . . .

— *Lavango de libroj el Hungario* —

Libroj, aperintaj en 1979:

Enciklopedio de Esperanto I-II. /Represo, 620 p./	£11,—
Gvidlibro por supera ekzameno /Historio-Literaturo-Metodiko, 362 p. .	£3,65
Baza literatura krestomatio /124 tekstoj de 54 aŭtoroj, 262 p./	£3,40
Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado /Studoj de Drezen, Lins Isajev ktp., 228 p./	£3,40
V. Benczik: Libro de romanoj /Resumoj de la romanoj de Vallienne kaj Luyken, 174 p./	£3,65
Hungaraj fabeloj /Dek fabeloj, 100 p., ilustr./	£2,45
Hund-bazaro /33 hungaraj porinfanaj poemoj, 80 p., ilustr./	£2,45
La steloj de Eger /Luksa bildrakonto pri mezepoka batalo, 64 p./	£1,46
133 tagoj /Artikoloj kaj literaturaĵoj pri hungara proleta revolucio en 1919, 244 p., ilustr./	£2,95
Zs. Móricz: Malriĉaj homoj/Tragika rakonto, 36 p./	£0,60
Zs. Móricz: Ĉiela birdo /Drama amrakonto, 60 p./	£1,97

Kelkaj pli fruaj libroj:

25 jaroj /Antologio de Belartaj Konkursoj, 207 p., ilustr./	£3,40
I. Lejzerowicz: El la "Verda Biblio" /Satiroj, 80 p., ilustr./	£1,97
S. Szathmári: Kain kaj Abel /Potenca originala novelaro, 288 p./	£4,—
J. Baghy: En maskobalo /Kvin unuaktaĵoj, 140 p./	£2,95
F. V. Dorno: Satiroj /Originalaj satiro kaj krimkomedio, 140 p./	£2,95
L. Tárkony: De paĝo al paĝo /Literaturaj eseoj, 121 p./	£2,95
E. Ady: La morto de la ĉielarko /Poemoj kaj artikoloj, 88 p./	£2,65
M. Jókai: La filo de l' ŝtonkora homo /Luksa bildrakonto, 64 p./	£1,46
G. Gárdonyi: La sklavoj de Dio /Historia romano, 409 p./	£2,65
F. Molnár: La knaboj de Paŭlo-strato /Knabromano, 188 p./	£3,40
Esperantologiaj Kajeraj 2 /Studoj de Tonkin, Frank KTP., 276 p./ ...	£4,—
Turista Kantaro /51 kantoj kun muziknotoj, 84 p./	£1,60
Esperanta-Kamboĝa Vortaro /148 p./	£4,40
Csiszár-Kalocsay: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj, 188 p./	£3,22
Balaton /Fotolibro pri hungara lago kaj ripozejo, bindita./	£0,75

**Mendu la suprajn librojn ĉe la Libroservo de Brita
Esperanto-Asocio:**

140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

(Se iu libro mankas al la stoko de BEA, oni mendos ĝin el Hungarujo,
sed tio kaŭzos ioman atendadon.)